5na Jaro. Julio - Nr 9

1946

# P A C O kaj J U S T E C O

Monata revuo de la grupo B r u g g e

Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista

Prezidanto : Drs F. ROOSE , J. & M. Sabbestraat,12,Brugge.
Sekretariejo: ROOSE-DE KERSGIETER, J. & M. Sabbestraat,12,Brugge.
Propagando : MAERTENS Gr., Nieuwstraat,54, ASSEBROEK.
Poŝtkonto : 291429, Maertens Gr., Assebroek.

## La IIa Kongreso de Flandra Ligo Esperantisto

1. La genezo.

Verŝajne ĉiuj estis kontentaj ke en tiuj- ĉi malfacilaj cirkonstancoj kelkaj volis preni sur si la ŝarĝon organizi la unuan postmilitan kongreson. Do la grupo " Paco kaj Justeco" estis honorigata per tiu tasko. Verdire ni mem sentis ke ni devis fari ĝin kaj fakte ni ankaŭ iomete deziris ĝin. Longtempa antaŭa preparado estis nur ebla en deklamado, kantado, teatroludado, ĥordancado. Ni efektive ofte faris tion laŭ pli malpli kontentiga maniero sed certe ne taŭga por publika prezentado. Dum nia programriĉa Kristnaska festo estis fakte nur kelkaj aferoj kiuj kapablus entuziasmigi alian publikon ol la nian.

Sed la kongreso estis ankoraŭ for de ni. Ni havis plie multe da malfacilaĵoj pri kunvenejo. Ĉiuj tiuj multaj malfacilaĵoj restis ĝis preskaŭ lasta minuto. Fine alproksimiĝis la tempo kiu postulas serioz an preparadon kaj ekorganizon. Pri preskaŭ ĉio ni estis en malcerteco. Kie la balo ? kie la dimanĉa vespero ? Ĉu la partoprenantaro estos sufiĉa ? " Maksimume cent " diris nia prezidanto. " Minimume cent" diris Sro E. Cortvriendt. Li pravis, ĉar ni atingis 110.

Sed kie la balo kaj kie la kulturvespero ? Multaj hoteloj kun taŭgaj salonegoj estis ankoraŭ okupataj de la aliancoj militistaroj. Kaj ni deziris ĉiujn ejojn proksimaj unu. de la aliaj kiel en 1938 kaj en la centro de la urbo ! Tio montriĝis ne ebla. Ni volis tiam plezurigi nian novan kunvenejestron kiu estis tre afabla por ni. Sed ĉu la salono ne estos tro malgranda por la balo ? Sed verŝajne ĝi pligrandiĝis dum la dancado ĉar efektive ĝi ne estis tro malgranda.

Kaj la salonego por la varieca vespero. Fine unu solvo trudis sin al ni ; ĉar ni ne plu havis elektebleco n. Ni do devige prenis la salonon kun la tre malgranda scenejo kaj la koridoroj malantaŭaj larĝaj.. je kelkaj fingroj. Niaj haroj rektstariĝis kiam ni unuan fojon tie ripetis..okazis kvazaŭ kontinua tertremo sur la scenejo; kaj en la salono, kompreneble, ni rompis ion ! Ĉie kie ni venas; kion ajn ni tuŝas ni rompas ion.

Kaj kie la dimanĉa tagmanĝo ? Kompreneble ne en la ĵus forlasita ejo. Kaj por kiu prezo ? En la daŭro de kelkaj tagoj la prezidanto estis alvokata al la diversaj hoteloj kie loĝos kaj manĝos la gekongresanoj, pro ŝanĝiĝo de prezoj. Konstante la situacio ŝanĝiĝis. Kaj ĵus antaŭ la fabrikado de la bulkoj, la bakisto anoncis ke li ne faros sen markoj. Demandi nun ankoraŭ markojn al la gekrongesanoj. Ne eble. Do niaj gemembroj donis la necesan kvanton.

Intertempe venis la unua laboro. La unuaj enskriboj alvenis. Kiel en 1938, ankaŭ nun la Antverpenanoj donis ekzemplon. Ni serĉis muzikistojn, ni kuris kvin,sesfoje al urbdomo por diversaj aranĝoj kaj favoroj kiel en 1938, k.t.p., k.t.p. .. kaj ni ripetadis.

Preskaŭ ĉiam ni estis ĝustatempe kompletaj krom unu aŭ du, kun la re-
zultato ke la aliaj komplete devis atendi. Ĉirkaŭ tiu tempo la fatalo
volis ke kelkaj inter ni preskaŭ dronis sub la amaso da hejma aŭ pro-
fesia laboro. Kelkaj aliaj malsaniĝis. La dimanĉon antaŭ la kongreso,
la prezidanto devis iri al la lito pro febroj. 10 Tagoj antaŭ la kon-
greso la uniformoj ne estis ankoraŭ pretaj. Ni eĉ ne ankoraŭ havis la
jam delonge promesitan ŝtofon !! Fine ni devis serĉi ĝin en alia maga-
zeno. Feliĉe ni trovis. Kaj dum tiu lasta semajno ni devis aranĝi ĉir-
kaŭ 20 uniformojn. Kaj ni ripetadis kaj ni ripetadis. Ni devis tiom
atenti pri la planko de la scenejo ke ni tute ne atentis pri tio kion
ni devis reprezenti. Ni ree kaj ree eraris. Tiu lasta ĝenerala ripe-
tado ! Estis fakte nur unu afero pri kiu ni estis certaj : la vetero.
Estis daŭre malbona vetero kaj tio ĝojigis nin ! Ĉar ĝi jam tiel long-
tempe daŭris, ni estis certaj ke finfine venos la bonega vetero dum
nia kongreso. Kaj tiel ni eniris la lastan nokton.

2. La Kongreso.

Sabaton matene kiam ni leviĝis estis belega vetero. Varme ! hela suno
kiu rave brilis. Tagmeze estis varmege. Posttagmeze: tondre varma !
kaj depost la 5a pluvis, ege kaj ade.. Forfalis la unua programpunk-
to : la promenado en la urbo. Tamen unu ĝojis : la prezidanto.
Alvenintoj devis atendi en la stacidomo. Fine oni povis riski sin sur
la stratoj. Al la akceptejo. Kaj al la hotelo. Vagonaroj kun malfruiĝo
alvenis. Forfalis la dua programpunkto : kuna aŭskultado de la sonori-
larkoncerto kiun la urbestraro oferis al ni. Mi hazarde kaj en rapi-
deco kaptis kelkajn muziksonojn.
Sed la tria punkto ne forfalis ! Ĉu vi do ne konas la flandrajn espe-
rantistojn ? Malrapide ili alvenis, sed tiam fervorege dancis.
Post tiom longa interrompo ! post tiom longa disiĝo ! Ĉu tio ne devis
esti fordancata ? Vi scias kiam gefratoj, geedzoj, gehejmanoj depost
jaroj ne plu vidis unu la alian, kaj kiam fine ili revidas..vi scias
kiel arde oni tiam enbrakiĝas, brakumas aŭ mi ne scias kio. Nu, tiu
granda familio estis jam denove kune..kaj oni brakinterplektis !
Oni komencis malfrue kaj oni finis malfrue.
Estis la komenco de la sukceso.

Dimanĉo. Matene ni aŭdis belan predikon de Rev. pastro J.DE MAEYER,
profesoro en la kolegio de l'Sankta Gertrude en NIVELLES. Ankoraŭ ne
ĉiuj streĉtukoj estis en ordo. Ni ne povis fini tiun laboron la tagon
antaŭe kaj nun la prezidanto klopodis aranĝi la lastan por la belfrido.
Tie-ĉi montriĝis unua-foje la ega senvpreteco de niaj bruĝaj institu-
toj. La urbestraro sendis nin al la "Teknika Servo" kiu ne volis mem
fari kaj sendis nin al la fajroestingistoj "kun komplementoj kaj sa-
lutoj" kiuj lastaj ne povis aŭ ne volis fari sen skribita atestilo
pruvanta ke ili devas fari tion. Tial ni ne povis efektivigi tiun bo-
nan propagandon por nia afero. Kaj tial mia edzino kaj mi envenis la
sanktan meson meze de la prediko. Laŭ kio mi aŭdis, tiu prediko de Rev.
Pastro J. DE MAEYER meritas ĉiun laŭdon.
Je la deka okazis nia solena (?) akcepto de la urbestraro en la urbdo-
mo. Kiel titolo de tiu-ĉi programparto plej taŭgus la nomo "farso ".
Kelkajn tagojn antaŭe la prezidanto L.K.K. estis urĝe alvokata al la
urbdomo por iu tre grava afero. Tiel delikata kaj grava ĝi estis ke eĉ
oni rifuzis ion komuniki al lia edzino kiu anstataŭe iris pro foresto
de la edzo. Sed...rifuzi ion al Henriette ! Kelkaj inter ni scias kion
tio signifas ! Do ŝi revenis hejmen kun la granda novaĵo ke la urbes-
traro volas precize scii la nombron de la solena(?) akceptotaj perso-
noj ĉar oni trinkos honorvinon kaj oni donacos cigaredojn(!) .
" Ĉu finfine la oficialaj instancoj valortaksos nian laboradon ? " ek-
kriis mi. Post iom da pripensado mi antaŭ-diris ke la urbestro mem ne
ĉeestos (ne pro kontraŭalkoholismo aŭ kontraŭtabakismo). Ne nur li ne
ĉeestis sed ankaŭ ne estis nek honorvino nek cigaredoj. En la skabeno-
saloneto ni estis akceptataj, preskaŭ en la en-kojn eliro jo, de skabeno
por instruado De Schepper kaj de Senatano Neels. Pri la unua persono
ni scias ke li estas favora al nia movado. Tial ni ne rajtis ofendi lin.
La prezidanto L.K.K. prezentis la L.K.K. kaj la estraron "renforcé " de
Fl.L.E. kaj diris ke du taskoj estas karaj al bruĝaj esperantistoj :
disvastigi Esperanton por kaŭzi interpopolan frataĝon kaj konigi

Bruĝon per Esperanto. Poste estis la devo de la skabeno por respondi. En sia parolado li pruvis ke li ja iomete konas la aferon de Esperanto kaj ĝian historion sed samtempe pruvis ke li ne sciis ke en 1938 okazis jam tie-ĉi kongreso de Fl. L.E. Li finis per iu ĝojkrio " estu trankvilaj, la kontrolistoj libertempas ! " Mi tute ne kaptis la rilaton inter tio kaj la temo de la parolado. Tial mi nur kapablas interpreti ĝin kiel publikan kaj oficialan alvokon al malobeo de leĝoj koncerne nutraĵaferojn. Kaj tiel ni forlasis la solenan akcepton. Ĝi almenaŭ havis tiun-ĉi avantaĝon ke nia estraro ne kapablis tute aŭ parte iri ebria al la impona Gotika salonego kie granda tasko atendis nin.
Li ne forgesu mencii ke ni invitis la gazetaron al niaj solenaĵoj kaj tiuj kiuj legis la multajn raportojn tiel en la franclingva kiel en la Nederlandlingva gazetaro eble opinas ke la gazetaro grandnombre estis reprezentata. Tamen,la ĵurnalistoj,kiuj ankaŭ ne ekzistas nur depost hieraŭ, sendis unu delegiton kiu faris unu raporton multobligitan kun unu traduko kaj tiamaniere ĉiuj gazetoj kompetente presis la samajn erarojn.
Mi esperas ke miaj karaj legantoj fine volos kompreni ke gazetoj ne ekzistas por informi. Do ni iris al la Gotika salonego por la ĝenerala jarkunveno de Fl. L.E. Ĝi ŝajnis jam bone plenigita. Kun sufiĉe da loko inter ĉiuj seĝoj kaj inter ĉiuj vicoj eĉ grandan salonon oni povas plenigi per relative malgranda amaso. Ni eĉ jam bedaŭris ke ni ne organizis ree propagandan demonstracion tra la urbo kiel ni faris en 1938. Per sama tekniko ni ja povis atingi longan sekvantaron.
La prezidanto L.K.K. unue paroladis. Kiam meze de emociiga silento li diris ke ok jarojn antaŭe ni ankaŭ staris kaj sidis tie-ĉi sed en tute aliaj cirkonstancoj, en la okuloj de la iom pli griziĝintaj kapoj aperis la unuaj larmoj.. aŭ estus devintaj aperi. Kiel komenco de parolado ĝi tamen estis tre bona (!) Plie li klarigas kiujn motivojn ni havas por tamen plu labori por Esperanto kaj por nia idealo, Malgraŭ la indiferenteco kaj la skeptikismo de la ekstera mondo.
Esperanto, pro ĝia disvastiĝo, faros multajn servojn kaj ni povas krei en nia Esperanto medio pli belan mondon. Tiuj du faktoj faras ke indas energie propagandi Esperanton kaj nian ideon. Poste ni aŭdis salutparolojn de delegitoj el Rotterdam, Brussel, Blankenberge,Heist op den Berg, Nijvel, Namur, Aalst, Antwerpen,Mechelen,Gent,Kortrijk,Nieuwpoort,Veurne. Sekvis tiam la raportoj pri pasinta agado, kiuj montris la grandan laboremon de Fl. L.E. La sekvantaj organizoj sendis salutleteron :
1) Federacio de laboristaj esperantistoj el Nederlando
2) Belga ligo de laboristaj esperantistoj
3) Belga sekcio de Tutmonda junulorganizo
4) La Nederlanda Ligo L.E.E.N. kaj la al multaj de ni konata ŝaño, L. Sole.

Kompreneble la Belga ligo, de kiu tamen du sekcioj formas intergrupan komitaton kun sekcioj de Flandra Ligo, ne sendis saluton kaj ne estis reprezentata. Post la fina parolado de Dr Van Gindertaelen, prezidanto de Fl. L.E. kiu donis sufiĉe ĝustan juĝon pri la virinoj sed kiun li en la vespero tamen opiniis ne aplikebla al la Bruĝaj samideaninoj, ni iris al la granda placo por la foto. Hela suno kaj nigra mallumo rapide sinsekvis por embarasigi nin. Efektive kiam la nenombrebla amaso finfine staris en ĝusta pozo kaj trankvila,la suno malaperis. Oni do ankoraŭ iom babilis kaj ŝanĝas je loko. Kaj tiam la suno reaperas. Kaj tiel plu.
Kun la flago alte, antaŭe, ni iris al la hotelo por la tagmanĝo. Flandroj ĉiam multege paroladas. Ankaŭ tie-ĉi devis paroladeto.
La prezidanto L.K.K. do diris mallonge kaj trafe ke tie-ĉi la oratoroj devas fakte esti la stomakoj kaj ke li do tuj donas la parolvicon al ili. La prezidanto Fl.L.E. respondis ke tiu diraĝo estis la plej saĝa vorto kiun mi ĝis nun elparolis.Ĉu ne la sola saĝa ?
Je la 4 ½ h. boatveturado sur la bruĝaj kanaloj. Por ĉiuj kiuj enskribis ! Do, ne krompago ! Mi profitis la okazon por ripozi ĉar malfacila vespero atendas nin. Tie-ĉi venas do interrompo en la raporto.
Je la 20 h. la salono jam estis bone plena. Regas jam la atmosfero. Granda streĉtukoj super la scenejo. La Flandra E° Instituto jam bone vendas siajn belajn kaj vere ne tro multekostajn librojn. Ni konatigas nian revuon "Paco kaj Justeco" . Denove la belegaj uniformoj de niaj grupaninoj tiel ravas ke la ĉeestantoj ne kapablas rifuzi."Proksiman jaron la aninoj de la "Flandrema Grupo" ankaŭ portos " asertas

Sano F.Voldurs. Bonege !
Subite, la laŭtparolilo anoncas ... Aŭskultu, oni komencas... ke pluvombrelo perdiĝis (!) Jes, tamen, tuj poste la spektaklo komenciĝas.
La Espero.. Ĉiuj staras. Verda lumo. Sur la scenejo uniformoj kiuj kantas. Malrapide nia altstatura Hubert solene antaŭvenas kun la flago, faras duonan turniĝon kaj prezentas la flagon. Jen la vera ĝusta stilo ankaŭ jam estis. Ĝi estos karakteriza por la tuta plua vespero. Stilo, disciplino, ordo.
" La bruĝaj piratoj". Eble la plej granda sukceso de la vespero.
Teado kaj gejunuloj sidantaj sur arbotrunko. Kantado kaj muziko, ĥordancoj kaj soldancoj; ŝanĝo de lumo.
Tondra aplaŭdo sekvis. Bonega komenco. Malantaŭ la kortenoj, la geaktoroj gratulas unu la alian, preskaŭ falas en brakoj pro feliĉo
Teatra skizo. Bonege ludas Etienne DE BAETS kaj M. E.-THERS ROOSE.
En la salono kelkaj ekhavas la opinion ke ni deziras la malaperon de "Heroldo " (!! ) Nova sukceso. Deklamo de ROSA JURION. Ĉiam sukceso.
Ĥordanco. Brave belaj tiuj uniformoj ! Aplaŭdo por la uniformoj. kaj ankaŭ, jes, por kiuj portas ilin.
Paŭzo. Manpremoj de gegrupanoj kiuj estis en la salono. Pirinde !
Belege !
Filmo. La procesio de la Sta Sango. Ofte klarigo venas ĵus kiam la bildo forpasis ! Ne gravas ! Poste filmo pri insektovivo. Kiel vi vidas , io por ĉies gusto. Kaj sportofilmo ! Kaj ree la dancoj.
Ofte la anonco de programpunkto estas tre poezia. " Revo. Kiom ofte oni ne forgesas banalaĵojn de l'ĉiutaga vivo ? Kiom da forto oni reakiros per la revo ! Kiom da artistoj ne prikantis ĝin en muziko, en liriko. Nun, karaj gesamideanoj, vi vidos ĝin en dancarto ". Scenejokurteno forglitas ( ĉu ne Andre Van der Donckt ? ) tre dolĉe kaj ni vidas arbaron. Kaj en angulo sur la arbotrunko im anĝelaspekta fraŭlino dormas. Dolĉa muziko resonas (kiun la artistaj kaj nelacigeblaj fingroj de Fino Marie-Louise Roose eligas el la piano) kaj jen venas viro. Kia bela viro estas Rosa Jurion ! Ĉu ne ! Ŝi vekigas Huguette NOTMAN kaj tiuj du steloj faras dancon...revo !
Tre forta numero prezentis Greg. MAERTENS kiam li ŝvebigis la prezidanton. Kaj ree ĥordanco kaj ree soldanco de Rosa sur muziko " la bela blua Danubo". Kaj alia teatra skizo, tiu de la hipokrita juĝisto
Et. DE BAETS kiu antaŭ publiko severe kondamnas la fiverkon de iu samideanino sed poste, sola kun ŝi, demandas ekzempleron kiam la verko aperos. Tiu-ĉi rolo bone konvenis al tiu SOSOSO direktoro. Li ceterе perfekte ludis ĝin. Kaj ankoraŭ belega ĥordanco, triope, Hubert, Marie-Louise BRUNEEL kaj Agnès DUPREZ.
Lasta punkto : hipnotismo.
Ĉu tio ne estis varieca vespero ?
Kiel hieraŭ vespere, ni nun iris al la hejmo sed ne ankoraŭ al la lito. Post tiuj vesperoj oni ne kapablas tuj dormi. Kaj, feliĉe, ni povis longe dormi.

Je duono post la deka, la tramo forportis nin al KNOKKE. Dum la vojaĝo ni sinsekve vidis diversajn pluvadojn kaj sunbriladojn. Tio ne haltigis nian kantemon. Estis kantanta tramo. Alveno en Knokke sub la pluvo kaj fuĝo en hotelo el kiu multaj inter ni forkuris sen mendi ion. "Paco kaj Justeco" iris al la marbordo por ludi. La postevenantaj gesamideanoj denove miris. Tiu grupo havas ankoraŭ kuraĝon, forton kaj spiron por arde pilkludi. Ĉirkaŭ tagmezo la tuta sekvantaro iris al Heist. Tie parto iris al hotel Mondial por tagmanĝi; ni rapide englutis panon por poste reiri al la maro kie ni ludis ĝis lasta minuto. Tiam rapide enordigi sin kaj ek al la tramo. Adiaŭa kunesto en Mondial-hotelo ni ne ĉeestis. Sed la adiaŭa kunesto okazis en la tramo.
Kanti, kanti, kanti. Alvenante en Brugge, proksime al la haveno, la prezidanto kaj M.L.Senave devis la unuaj eliri. Li direktis kelkajn kernajn vortojn al la kunvojaĝantoj kaj de ĉie eĥis lia krio " Vivu Esperanto " La entuziasmaj gekongresanoj eĉ aldonis "Vivu Bruĝo ".
De multaj gesamideanoj ni aŭdis la vortojn : ni havis tri belegajn tagojn kaj tio dank' al sekcio Brugge. La prezidanto Fl. N.S. diris ke li ne trovis la decajn vortojn por laŭdi, eĉ ne en la plena vortaro.
Ni mem estas almenaŭ tiel kontentaj kiel la gekongresanoj.

3. Epilogo.

Ĉu tiu kongreso nun vere finiĝis ? Preskaŭ ne imageble ! Tiel belaj tagoj ! Nun jam for, tiu festatmosfero ? Jam nenio pli ol la rememoro ? Jes, la fruktoj. Ĉar tia kongreso certe havos rezultojn. Jam multaj enveninta j leteroj atestas pri la kuraĝo, entuziasmo refortiĝo kiujn la ĉeestantoj ekhavis. ( Jen jam unua rezultato :SOSOĈO reviviĝis ! ) Tamen neniu de nia grupo jam volis disiri. Ili volis kune resti ĝis plej malfrue. Do, vespere oni kunvenis en la ejo kie du tagojn antaŭe oni tiel gaje baladis(!) kaj kie komenciĝis tiu memorinda kongreso. Ankaŭ tiun parton ĉeestis nia gastino Fino HAGE el ROTTERDAM. Ni ankoraŭ festis. Se mi havus iom da ĵurnalisma fantazio, mi dirus ke ni preskaŭ dronis en la ĉampanvino kaj ke la plej belaj perloj de retorik -kant - kaj deklamarto estis tie montrataj. La postan ĵaŭdon la prezidanto L.K.K. ankoraŭ solene parolis pri tiu multsignifa kongreso. Li akcentis ke ni tiel belan rezultaton kapablis atingi certe pro la kapableco de multaj inter ni sed ĉefe pro la bonega spirito en la grupo. Se tia spirito restas, la estonteco estas garantiata. Familia sento, unueco, disciplino, disciplino en la prospero kaj en la malprospero, en la gravaj decidoj kaj en la eraroj: jen la firma bazo de ĉiu ideologia konstruaĵo. Se tiuj restas, ĝi estos, por nia grupo, la plej bela rezulto. Kaj cetere ni estu fieraj kaj feliĉaj ke ni jam tiom povis fari por la E° movado ĝenerale kaj por Flandra Ligo speciale. Vivu " Paco kaj Justeco".

Raportanto.

= = = = = = = = = = = = = = = =

| Flandra Ligo Esperantista |

Decido de la XIa kongreso de "Flandra Ligo Esperantista" en BRUGGE dum PENTEKOSTO 1946.

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en sia ĝenerala kunveno de la 9-a de junio 1946-a :

1° esprimas la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj senprokraste kaj en reciproka toleremo pristudu la eventualan reunuiĝon de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado ;

2° esprimas la esperon ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plejlaste okaze de la unua postmilita Universala Kongreso ;

3° instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Asociojn, neŭtralajn aŭ ne-neŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto-instanco kiu reprezentus ĉiujn esperantistojn senescepte ;

4° decidis komuniki tiujn deziresprimojn al la Esperanto-gazetaro por ke ili veku ĝeneralan atenton kaj simpation kaj pritraktis plu la tagordon.

NASKIĜO

Ĉe niaj prezidanto kaj sekretariino naskiĝis filino la 10.5.46. Nomo : Ingrid. Sur ŝia kuseno supre de la kapo jam tronas verda stelo. Sur la anoncilo estas verda stelo kiu troviĝas supre de la baptofonto kaj kiu poste iros al la ĉielo meze de la aliaj steloj. Bonaj antaŭsignoj ! Al Henriette kaj Fernand korajn gratulojn de ni-ĉiuj. Al Ingrid : bonvenon !

Post la Blankenberga-kongreso de TOJO du Anglaj junuloj intencas kun sia instruisto (esperantistoj) bicikli tra Belgujo. Ili deziras renkonti esperantistojn. Se vi povas renkonti ilin, skribu al F.W. ARMITAGE - WINDYRIDGE WINSCOMBE - SOMERSET ENGLAND.

NIA RENCENZOJ : Al kompetenta Flandra ekleziulo ni demandis kritikon pri la ĉi-sekvanta verko. Al ambaŭ, verkinto kaj tradukinto, nian dankon !

La Redakcio.

H.L.EGERRUP, Drc DORNAR, Aabijh , Dànsk Esperanto Forlag, 1945, 209 p.

El la vidpunkto de la Generala Moraljuro kaj de la Katolika Moralo la verko de H.L.E. estas malbona libro. En tre alloga, preskaŭ romantika maniero, kun danĝera propagandefiko, la aŭtoro defendas, kiel tre naturajn kaj legitimajn tezojn, la plej abomenindajn praktikojn.
La verkinto pardonos al ni, se ni diras ke lia libro memorigas nin pri la plej hontinda nazisocialista literaturo. Lia libro estas ne nur malmorala, ĝi estas preskaŭ sendia, kaj certaj esprimoj insultas la honoron de Dio. Se la aŭtoro estas kredanto, li ja apartenas al la plej ekstrema liberala skolo, por kiu Dio estas la nobla ekzilulo, forpelita el la homa socio. Praktike lia libro estas materialisma-ateisma verko. Liaj praktikaj vivprincipoj ŝajnas esti : 1° ĝui kaj fari ĝuoplenajn homojn; 2° la celo praviĝas la rimedojn.
Estas nobla celo pliboniĝi la homan rason. Ankaŭ ni alcelas tiun idealon. Sed ni konceptas ĝin alia ol H.L.E.
La korpa valoro de la homo estas, laŭ ni, nek la sola, nek la plej alta homa valoro. La celo de la korpa valoro certe estas posedi pli belan materian vivoforton, sed ankaŭ kaj precipe : doni al la specifc homaj valoroj, nome la spiritaj kaj moralaj fortoj, pli lertan kunlaboranton. Ni ne volas pliboniĝi la homrason sur la sama bazo kiel ĉeval - aŭ bovrason.
La besto estas nur servodevo; la homo, pro sia spirita strukturo, estas digneco. La libro de H.L.E. estas atenco kontraŭ la homo.
Ni ne povas konsenti kun liaj konceptoj ja tro brutaj pri arta graveidgo, en kiuj la rajtoj de la edzo estas rezignataj kaj la junaj virinoj liverataj al premiita seksperforto.
Lia idealo de mondpaco, realigota per internacia arta prostituado kaj adulto, estas absurdaĝo. Kiel paco povus estiĝi en socio naskita el la senhonoriĝo de la morala homo ? Tiu socio estos hordo da bestoj pelataj de tirano aŭ reciproke sin formanĝegantaj.
Malnobligi la generpovon de homo ĝis nura erotikado, sen aliaj leĝoj el la leĝo de la plezuro, tio estas instrui degeneron tiom korpan kiom moralan.
Lia militarisma entuziasmo por bredi soldatojn en sia homkulturejo ŝajnas al ni malbone akordiĝi kun lia klopodo por realigi internacian pacon ! Olivbranĉo kaj pafilo kreskas en la sama arbaro de tiu laŭdira savonta doktrino !
En la homo H.L.E. ankoraŭ nenion alian malkovris ol la beston. Ni bedaŭras tiun prokrastiĝon.
Kiel homo ni juĝas la libron maldigna; kiel katoliko ni opinias ĝin naskite obscena.

Flandrlingve verkita de kanonika moŝto V.HEYLEN, laŭ peto de la tradukinto,

Pastro-Profesoro J.D.MAHYER.

Ni recenzas: " Jarlibro 1946 de I.E.L. unua parto " 184 p.

Kiel oni vidas tiu unua parto estas jam multe pli ampleksa ol tiuj de la pasinta jaro. La enhavo estas riĉa kaj tre interesa. Statistikoj pri la membraro, kaj listoj de la honoraj-, dumvivaj-, patronaj-kaj subtenantaj I.E.L. membroj.Listoj de la esperantistaj landaj asocioj kaj de la gazetaro. En tiu lasta mi ne jam rimarkis "Heroldo". Troviĝas ankaŭ landaj agadoraportoj el Aŭstralio, Britujo, Bulgarujo, Fiĝio, Finnlando, Hispanujo, Nov.Zelando, Sud-Afriko, Usono. Ankaŭ tie-ĉi ĝus kiel en la longa listo de la delegitoj ni absolute neniun informon trovas pri Sovjet-Ruslando. Strange ke iuj kriegantoj pri subpremo de la libereco en kelkaj landoj,neniam atentigas pri tiu-ĉi maltrankviliga fakto. Ŝajnas al ni ke ankoraŭ ekzistas landoj sen libereco. Aŭ ĉu estas la absolute libera volo de la Rusaj gesamideanoj kiu tenas ilin for kaj kaŝitaj por ni ? Post la parto de la delegitoj venas listo de 185 fakoj en kiuj oni povas esti delegito. Tiu nombro povas ankoraŭ plialtiĝi. Fakte tre bona ideo,ĉar la demandoj por kiuj la delegitoj povas esti superŝutitaj estas tiel diverstemaj ke vere necesas specialigo. Cetere ĉu ni ne vivas en la tempo de la specialigo ? Sed nun ni devas trovi kompetentajn personojn pri ĉiuj tiuj temoj en almenaŭ la plej interesaj urboj de ĉiuj landoj. Kaj tiam la jarlibro publikigota estos ampleksega. Krom ankoraŭ multaj aliaj listoj, tiu interesega dokumento finiĝas per listo de verkoj nun denove haveblaj ĉe I.E.L.libroservo.

P.K.J.

- - - - - - - - - - - - -

Pri ? ? Enigmo ? ?

- - - - - - - - - - - - -

Por la enigmo farita de sam. Roger ISERENTANT,mi ricevis bonan solvon de Roger DESCHEPPER : ( 5 poentoj).
Sam. André SPRUYTTE havis unu eraron ( 3 poentoj)
Sam.(ino(j) Germ. MAILLET, M.TH.ROOSE, ET. DEBAETS ( 2 poentoj).
Sam. Roger ISERENTANT akiris 5 poentoj (forfait).

Por la lasta enigmo, ankoraŭ neniu ensendis bonan solvon.
Et. DEBAETS,Roger ISERENTANT, André SPRUYTTE, Germ. MAILLET,Gr.MAERTENS
2 erarojn : 2 poentoj.

Jen la situacio hodiaŭ 14.VI.46.

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Roger ISERENTANT | 21 |
| 2. | André SPRUYTTE | 20 |
| 3. | Germ. MAILLET | 18 |
| 4. | M.TH.ROOSE | 16 |
| 5. | Gr. MAERTENS | 15 |
| 6. | Et. DE BAETS | 14 |
| 7. | Gilb. BRUYNEEL | 13 |
| 8. | DE SCHEPPER André | 7 |
| 9. | Fern. ROOSE | 5 |
| | H. DE KERSGIETER | 5 |
| | M.L.SENAEVE | 5 |
| | A. Van der DONKT | 5 |

prizorgis Em.Stalpaert.

- - - - - - - - - - -

Nenio pli bone klarigas la moralan devojiĝon de la moderna Mondo ol ĝia indiferenteco por tio kio estas bona,ĝia nekompreno pri tio kio estas bela, kaj ĝia totala malhavo je interna vero

(Urbain V.d.Voorde "Het Pact v.Faust p. 149 )

La plej alta scienco estas : fari dum vivo tion kion ni dezirus esti farinta je mortalveno.